

Premio Mauro La Torre

La familio de nia eks-prezidanto de ILEI **Mauro La Torre** ekrilatis kun ILEI proponante PREMION.

En aŭgusto 2014 ILEI informis pri tiu eblo publikigante la regularon pri tiu Premio. La proponitaj laboraĵoj devas iel rilati kun la esplorkampoj de Profesoro Mauro La Torre : apliko de lingvoteknologio al Esperanto, retaj kursoj, evoluo de vorttrezoro de Esperanto, interkultura edukado per Esperanto.

En januaro ILEI ricevis unu validan anoncon de D-ro Davide ASTORI el Italio. Lia proponita temo estis esploro pri la verko de Collodi « Pinokjo » :

LA TRADUKOJ DE “PINOKJO” : KIEL EVOLUIS ESPERANTO INTER 1930 KAJ 2003.

La traduko de 1930 estis farita de Mirza Marchesi.

La traduko de 2003 estis farita de Jozefo Horvath (pseŭdonimo de Giuseppe Croatini).

Sekve tiu anonco ILEI starigis ĵurion. En ĝi membras

D-ro Michel Duc Goninaz

D-ro Marcos Cramez

D-ro Renato Corsetti

S-ino Margherita d’Onofrio, vidvino de Mauro La Torre

S-ino Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI

En marto ILEI ricevis la laboraĵon kaj la ĵurio komencis sian laboron.

D-ro Astori detale observis la lingvaĵon de tiuj du tradukintoj, starigis komparojn, montris ekzemplojn. Legante lian verkon oni akiras klaran bildon pri la evoluo de nia lingvo ene de pli ol 70 jaroj.

Unuanime la ĵurio aprobis la transdonon de la Premio 2015 al tiu esploro de D-ro Davide Astori.

La Premio ricevota de D-ro Astori konsistas el 500 EUR.

La dokumento iros en papera formo al la ĉefaj bibliotekoj de nia movado.

La venonta Premio estos lanĉita en oktobro 2016 kaj eble transdonita en julio 2017.

Oostende, Belgio

2015-07-17